

Lord George Gordon Byron ,  
Nokt' en la koro

*tradukita de Leopold Blumental*

Nokt' en la koro . . . la harpo kuŝas . . .  
Vi tuj ekkantu, kantisto!  
Se vi la kordojn de l' harpo tuŝas,  
Vi miron faras, artisto.

Se kor' ankoraŭ havas esperon,  
Per kanto ĝi revekiĝos;  
Se la okulo kaŝis larmeron,  
Denove ĝi eklarmiĝos.

Kant' via tondru mondan doloron!  
La gajon mi ne komprenos . . .  
Vi min plorigu, movu la koron,  
Aŭ mia brust' ne eltenos.

Ĝi de suferoj longe manĝiĝis,  
Silentan premis la ĉeno! . . .  
La tempo venis . . . ĝi jam pleniĝis  
Kiel vazet' de veneno.

*Traduko de la Angla poemo "My soul is dark" de LORD GEORGE GORDON BYRON (\*1788-01-22 - †1824-04-18) en Esperanton de LEOPOLD BLUMENTAL (Leo Belmont, \*1865-03-08 - †1941-10-19).*

*Arg-1018-2061 (2014-05-20 16:42:26)*

*Pri la tradukinto vidu la vikipediejn [http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo\\_Belmont](http://eo.wikipedia.org/wiki/Leo_Belmont). La poemotraduko troviĝas en <http://edu.i-lo.tarnow.pl/esp/lern/librejo/0012/0008.php> kaj en [http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta\\_Krestomatia/Nokt'\\_en\\_la\\_koro](http://eo.wikisource.org/wiki/Fundamenta_Krestomatia/Nokt'_en_la_koro).*

Lord George Gordon Byron ,  
My soul is dark

My soul is dark – Oh! quickly string  
The harp I yet can brook to hear;  
And let thy gentle fingers fling  
Its melting murmurs o'er mine ear.

If in this heart a hope be dear,  
That sound shall charm it forth again:  
If in these eyes there lurk a tear,  
'Twill flow, and cease to burn my brain.

But bid the strain be wild and deep,  
Nor let thy notes of joy be first;  
I tell thee, minstrel, I must weep,  
Or else this heavy heart will burst;

For it hath been by sorrow nursed,  
And ached in sleepless silence long;  
And now 'tis doom'd to know the worst,  
And break at once – or yield to song.

*Verkinto de tiu ĉi Angla poemo estas LORD GEORGE GORDON BYRON (\*1788-01-22 - †1824-04-18).*

*Arg-1018-2060 (2014-05-20 20:08:48)*

*Pri la poeto vidu la vikipediejon [http://eo.wikipedia.org/wiki/George\\_Byron](http://eo.wikipedia.org/wiki/George_Byron). Jen ankaŭ la retejo de la Bajron-societo, Byron-society: <http://www.thebyronsociety.com/contact.html>.*